

Kompara Legaĵo

Ĉiam variaj geedziĝoj (ĉu kun aŭ sen amo), malĝojaj disiĝoj kaj ĝojaj revidoj, kiujn oni ne povis antaŭscii, estas plej ofte vidata kaj ne-finskribebla temo de literaturaj verkoj far aŭtoroj ĉu ĉinaj aŭ neĉinaj, ĉu antikvaj kaj nuntempaj. Tiaj verkoj kreskas kaj akumuliĝas kun tagoj en granda nombro, ĝis maksimumo. Kaj ni rimarkas ke inter la nuboj da amrakontoj, krom nesamaj nomoj de la geprotagonistoj, legiĝas foje iom similaj detaloj aŭ partoj en intrigo. Legante tiujn laŭdevene ekzotajn sed ŝajne konatajn verkaĵojn, ni, legantoj en malsamaj tempoj kaj lokoj, ofte sentas neatenditan surprizĝojon.

Puŝkin verkis novelon kun titolo <Neĝa Blovado> kiu viciĝis en la <Noveloj de Berkin>. Puŝkin verkis la novelon en 1830, publikigis ĝin en 1831. Grabowski esperantigis ĝin en 1888. Atentu la tempon: nur unu jaron malpli frue ol la publikigo de Esperanto en 1887. Ni scias ke inter la famaj esp-istoj de la unua generacio, estis tri poloj (Kolosa Triopo): D-ro Zamenhof, la iniciatinto de Esperanto; Grabowski konata kiel la patro de Esperanta poezio; kaj Kabe, konata kiel la patro de Esperanta prozo. Ĝis hodiaŭ iliaj verkoj ankoraŭ estas legindaj klasikaĵoj por ĉiuj lernantoj de Esperanto.

En interreto nun ni povas trovi la esp-igon de la <Neĝa Blovado> far Grabowski kaj ĝian ĉinigon. Kiam mi Guozhu legas tion, pretervole mi ekmemoras du similajn rakontojn en la ĉina literaturo: <Eksteratenda Akiro de Edzino> en Amrakontoj kaj <Per ŝerc-vortoj Jiang Zhenqin akiris edzinon> en la ĉapitro XII de la <Unua Kolekto de Mirigaj Rakontoj>. Mi tradukis la du rakontojn el la ĉina, faris tion afiŝoj por kompara legado de esp-istaj legantoj.

Titoloj

- ☆ Eksteratenda Akiro de Edzino (Trad. Guozhu)
- ☆ Per ŝerc-vortoj Jiang Zhenqin akiris edzinon (Trad. Guozhu)
- ☆ Puŝkin: LA NEĜA BLOVADO
el la rusa Grabowski 1888

<http://www.esperanto.org/Ondo/Rn-pusk2.htm>

Eksteratenda Akiro de Edzino

Instruituloj A kaj B kune vizitis al fremda loko. Hazarde ilin trafis ŝtormo kaj pluvo. Ambaŭ kune rapidis ŝirmi sin sub tegmento de kabano. Post longa momento, vesperiĝis, tamen la pluvo ankoraŭ daŭsis eĉ pli forte, tiel ke vestoj de la du instruituloj tute malsekiĝis. Ili volas trovi pli vastan lokon tranokti. Jen ili vidis ke antaŭ nedista distanco staris domo, kies pordon estas fermata. Ambaŭ haste iris tien kaj volas frapi je la pordo. Dum instruitulo B skrupulis ĉu la dommastro rufuzos, instruitulo A ŝerce diris al B: "Estu trankvila! Ĉar ĉi tie estas la domo de mia bopatro. Frapu !"

Aŭdinte tion interne de la pordo, la mastro malfermis la pordon kaj demandis: "Kiu el vi estas mia bofilo?"

Paliĝis instruitulo A. La mastro salutis Instruitulon B kaj invitis B eniri.

Turnante sin al instruitulo A la mastro diris: "Ĉar vi estas mia parenco, do atendu eksterdome!"

Instruitulo B pardon-petis por sia amiko A. Sed la mastro ne volas aŭskulti tion. Li regalas B per bonaj frandaĵoj kaj kondukis la gaston al dormoĉambro nur nelonge antaŭ noktomezo.

Ĉagrene ir-revenis eksterdome instruitulo A, kun pento pri sia senĝentila ŝerco.

Jen la pluvo ĉesiĝis, sed vento blovis lian malsekan veston ankoraŭ pli malvarma.

Kaŭre kuntiriĝis sub la tegmento, la malfeliĉa instruitulo A neniel povis endormiĝi.

Noktmeze, subite aŭdiĝis flustro el trans la pordo. A supozis ke venas lia amiko B kun helpo. Do li pene levis sin. Post momento, la pordo malfermiĝis. En malhelo vidiĝis neklare figuroj de du junulinoj, el kiuj unu transdonis al A pakaĵon da vestoj, dirante: "Ho, s-ro, ĉu vi jam venis ? Nun ni foriru kune!"

Ne sciante kio okazis, instruitulo A tamen akceptis la pakaĵon kaj rapidis kunportante la du junulinojn. Dumvoje la du junulinoj diris al li ion aŭ alion, sed A respondis ĉiam nur per ambiguaj jesoj. Post tagiĝo, la du junulinoj konsterniĝis, rigardante unu la alian kaj diris: "Ho, ne estas li!" Tamen ili jam havis neniun alian elirejon.

Okazis tiel: Filino de la dommastro havis sekretan interkonsenton kun sia kuzo, ke ili, la geamatoj, kune forkuru kun ŝteltita mono kaj mendis la noktmezon kiel rendevuan horon. Tamen, antaŭ ol alvenis la kuzo, venis instruitulo A, kiun ili misprenis atendito kaj lin sekvis. El la du junulinoj unu estis ĉambristino kaj la alia — fraŭlino. Instruitulo A revenis hejmen kune kun la fraŭlino kaj geedziĝis kun ŝi. La fraŭlino estis ĉarma belulino, kaj la novgeedzoj vivis harmonie.

La sekvan matenon, la mastro eksciis ke malaperis lia filino lastnokte. Li suspektis ke A forŝtelis la fraŭlinon. Li pridemandis al s-ro B, sed B senkulpigis sin respondante ke li sciis nenion. La mastro do sekvis s-ron B viziti al la domo de instruitulo A. Ĉar la familio de A estis bonhava, kaj ankaŭ la mastro volis kaŝi la skandalon, do li vizitis kiel vera bopatro kaj diris ridante: "Ho, vi nomis min bopatro ekster mia domo, ĉu tio okazis laŭ destino de Ĉielo?"

Poste A fariĝis altrangulo kaj lia edzino ankaŭ honordamo.

(Trad. **Guozhu** el la volumo II de "Amrakontoj")

Per ŝerc-vortoj Jiang Zhenqin akiris edzinon

Ĉapitro XII

Dum pluvego S-ro Tao retenis la gaston
Pro vortoj Jiang Zhenqin ekhavis edzinon

Poemo:

Ĉiu trinko, ĉiu akiro
okazas laŭ antaŭdestino.
Hazarda ŝerc senintenca
validas tamen ĝis vivfino.

Ĉio en homa vivo estis decidita de antaŭdestino.

Eĉ hazarda ŝerc dum amuza momento, se ni komparus kontrole per la sekva okazintaĵo, validas kvazaŭ preciza antaŭdiro. Do ni povas konscii, ke, dum li ŝercas, fantomo kaj feo jam faris decidon anstataŭ li, sed ne hazarde.

Vivis en la jaroj de Chongning-erao (1102-1106), Song-dinastio, juna instruitulo nomata Wang el la okcidenta Zhejiang-provinco. Kiel kandidato foje li venas al metropolo por partopreni en la ŝtata ekzameno.

Iutage, antaŭ vespero, li iris al Yanqiu-kvartalo laŭinvite al festeno de amiko. Kiam li iris preter negranda domo, li ekvidis tie knabinon, tre belan, kiu staras sola en la pordo, kun sopira rigardo, kvazaŭ iun atendente.

Instruitulo Wang fikse rigardis al ŝi. Tiam grupo da rajdantoj sur ĉevalo brue algalopas, la knabino tuj forevitis, kaj instruitulo Wang ankaŭ haste foriris, sen demandi pri la familia nomo de la domo.

Instruitulo Wang vizitis al la festeno de sia amiko. Kiam li revenis en duona ebrio, jam estas la tempo de la unua nokta gardoperiodo.

Li denove iris preter tiu domo. Rigardante al la interno li trovis la pordon jam fermita kaj regis nur silento.

Instruitulo Wang iris laŭ la maldekstra muro kun deziro observi ĉu la domo havas malantaŭan pordon?

Li iris dekojn da paŝoj kaj ekvidis tie vakan teron, kie estas fermita negranda pordo.

Instruitulo Wang pensis: “Tage mi vidis tie belulinon. Ĉu mi havos la feliĉon revidi ŝin foje?” Li rigardis al la malantaŭa pordo. Ĝuste kiam li hezitis tie kun amemo, subite el la muro ĵetiĝis io, kiu falis teren kun bruo kaj apenaŭ trafis instruitulon Wang.

Li levis tion observi kaj trovis tion tegolo.

Tiam la brila luno ĵus leviĝis kaj faris ĉie tiel hela kiel en tago.

Instruitulo Wang rigardis al la tegolo kaj ekvidis ses vortojn: “Atendu ĉi tie en la nokto!”

Instruitulo Wang komprenas ke estas io sekreta. Kun iom da ebrio li ridis parolante: “Ho, mi ne povas scii kiu sendas la rendevuo-inviton? Lasu min fari ŝercon.”

Instruitulo Wang prenis de muro kalkan pecon kaj skribas sur la tegolo jene: “Eliru post la tria nokta gardo-periodo!”

Li ĵetis la tegolon returnen trans la muro. Foririnte je dekoj da paŝoj instruitulo Wang observas de malproksime ĉu io okazos.

Post momento, instruitulo Wang vidis ke venis al la muro fraŭlo, kiu klinis sian kapon kaj verŝajne serĉas ion. Li serĉis kaj serĉis tie, sed nenion li sukcesis trovi. La fraŭlo vesuspiris al la muro kaj fine per necertaj paŝoj foriris.

En malhela ombro instruitulo Wang vidis tion tre klare kaj diris al si mem: “Tre eble tiu estas la homo kiu mendis la rendezuon. Tamen mi ne povas scii kiu estas interne de la domo. Mi supozas ke certe iu alvenos kaj mi pacience atendu ĉitie.”

Kiam li atendis ĝis la tria nokta gardo-periodo, la luno leviĝis jam sufiĉe alte. Fumo kaj nebulo ŝvebis de ĉiuj flankoj. Vekiĝis el ebrio instruitulo Wang. Li faris etendiĝon, oscedis kaj ridante diris al si mem: “Anstataŭ endormiĝi, kial mi okupas min per aferoj de aliaj homoj?”

Ĝuste kiam li volas paŝi revenen al sia loĝejo, subite aŭdiĝis knaro de la malgranda pordo apud muro. La pordo malfermiĝis kaj unu fraŭlino puŝiĝis elen. Sub la arĝenta lunlumo oni povas vidi ke ŝi havas tre gracian figuron. Sekvante post ŝi eliris maljuna servistino, kiu portante grandan bambuan kofron iris eksteren. Instruitulo Wang iris renkonte al ŝi kaj bone rimarkis ke la fraŭlino ĝuste estas tiu kiu staris sola ĉe la pordo en la tago.

Vidante ke homo venas, la fraŭlino tute ne evitis. Ŝi daŭre iris renkonte. Kiam ŝi bone observis la venanton, ekparolis surprizite: “Ho, ne estas li, ne estas li!”

La fraŭlino returnis sin rigardi la maljunan servistinon. La maljuna servistino paŝis antaŭen, frotis al si je okuloj por rekoni la instruitulon Wang kaj ŝi ankaŭ diris: “Ne estas li, ne estas li! Rapide eniru!”

Tiam instruitulo Wang baras la malantaŭan pordon per sia korpo. Li ekkaptis la vestaĵon de la fraŭlino kaj kriis: “Ĉu vi ankoraŭ volas eniri? Vi estas fraŭlino de bona domo. Kial vi aŭdacas inviti ke alia homo venu al sekreta rendezuo? Se mi eksplodas malkaŝi vian fiagon, skandalo falos al via familio! Mi venas ĉitien nur hazarde. Tio okazas laŭ antaŭdestino inter vi kaj mi. Vi prefere iru sekvi min. Mi estas partoprenanto de provinca ekzameno, tial mi ne malhonoras vin.”

Aŭdinte tion, la fraŭlino tremis tutkorpe. Larmoj ŝprucis pluve. Ŝi ne sciis kion fari.

La maljuna servistino diris: “Ho, se li malkaŝos nian aferon, estas vere malutila por ni! Se tiu ĉi sinjoro estas sukcesinto de provinca ekzameno, fraŭlino, prefere vi sekvu lin portempe al lia loĝejo. Ĉar nun ni havas neniun alian elirejon. Baldaŭ tagiĝos. Se oni vidos nin, estas vere danĝere!”

Dum la fraŭlino ankoraŭ ploris, instruitulo Wang tiris ŝin je ŝia vestaĵo. Vole-nevole ŝi obeeme sekvis lin iri al lia loĝejo. La instruitulo loĝiĝis ŝin en malgranda mansardo. Li eĉ restigis ankaŭ la maljunan servistinon ke ŝi daŭre servu al la fraŭlino.

Kiam la fraŭlino fariĝis trankvila, instruitulo Wang demandis al ŝi pri detaloj kaj ŝi respondis dirante: “Mi havas familian nomon Cao. Mia patro forpasis jam delonge. Mia patrino naskis nur min sola. Tial ŝi tre dorlotas min kaj volas edziniĝi min al bona familio. Mia onklino havas filon, kiu kreskas tre saĝa kaj ekde infaneco havis intiman rilaton kun mi. Tial mi tre volontas edziniĝi al li. Tiu ĉi maljunulino estas mia mamnutristino. Mi petis ke ŝi diru al mia patrino pri mia deziro. Tamen, opiniante ke la familio de mia onklino estas senranga, mia patrino ne konsentas ke mi edziniĝu al li. Mi petas al mia mamnutristino informi al mia kuzo, mi mendis rendezuon je la kuranta nokto, ke li ĵetu tegolon en mian korton, tiam mi malfermos la pordon kaj sekrete forkuros kune kun li. Mia kuzo efektive respondis per tegolo, kun mendita tempo je la tria nokta gardoperiodo. Tamen, kiam mi venas laŭ tiu tempo, mi ne vidis lin kaj vidis nur vin. Mi ne scias

pri la kialo. ”

Instruitulo Wang ekridis. Li konfesis ĉion kiel li ŝerce skribis sur tegolo, ĵetis ĝin internen kaj poste vidis junan homon kiu vane serĉis ĉitie sen sukceso kaj devis foriri kun vesuspiro.

La fraŭlino suspire diris: “Ho, tiu foririnto certe estas li.”

Ridante instruitulo Wang diris: “Feliĉe mi trovis hazarde tion. Ĉu ĉio okazas laŭ antaŭdestino de geedziĝo por 500 jaroj?”

Havante neniun alian elirejon kaj vidis ke instruitulo Wang kreskas belaspekta, la fraŭlino vole-nevole devis edziniĝi al li. Kiel novaj geedzoj la nova paro vivis en granda amo.

Post fino de la ekzameno, publikiĝis la nomaro de la trapasintoj. Instruitulo Wang malsukcesis en la ekzameno. Tiam li vivis en arda amo al la nova edzino, tial rigardis la malsukceson en la ekzameno tute negrava. Li kaptis la tempon nur ĝui la ĝojon.

En la bambua kofro kunportita de la juna novedzino estas multe da oro, arĝento kaj trezoroj. Kiam mankas mono al instruitulo Wang, li prenis el la kofro de sia novedzino kaj tiel vivis por kelkaj monatoj. Instruitulo Wang eĉ forgesis pri reveno al sia propra hejmloko.

La maljuna patro de la instruitulo Wang sopiris sian filon en hejmo. Sed post multaj tagoj li ankoraŭ ne vidis la revenon de sia filo. La maljuna patro do demendis al homoj kiuj revenis de la metropolo kaj ili respondis jene: “Nun li havas novan edzinon en loĝejo kaj ĝuas ĝojan vivon. Kial li ankoraŭ volas hejmen reveni?”

Informiĝinte pri tio, la maljuna patro tre koleris. Li skribis leteron kun severa averto kaj sendis du intendantojn veturi al la metropolo por urĝigi la filon hejmen reveni. Li ankaŭ sendis leteron al sia amiko en la metropolo kun peto ke li vizitu al lia filo kun preta vojaĝpago devigi lin tuj reveni al hejmloko kun nenia prokrasto!

Vole-nevole instruitulo Wang devis adiaŭi al la nova edzino dirante: “Ho, tio okazas vere ekster mia intenco kaj nun mi devas unue hejmen reveni. Mi revenos al vi je la unua ŝanco. Aŭ mi raportos ĉion malkaŝe al mia patro kaj rekte venos al vi, ankaŭ estos eventuala eblo. Nun vi pacience kun via mamnutristino atendu mian revenon ĉitie en loĝejo.”

Li adiaŭis larmante kaj revenis al sia hejmloko. Lia patro tiam promocias por funkcii al Fujian-provinco kaj ĝuste preparis sin por ekveturi kune vojaĝi al Fujian. Ne trovante bonan ŝancon raporti pri la nova edzino, instruitulo Wang sentis malĝojon. Li devas vojaĝi al la laborloko de sia patro kaj tie sopiras la novan edzinon tagnokte.

Nun ni parolu pri la juna novedzino en la metropolo. Kune kun sia mamnutristino ŝi atendis en loĝejo. Duonon el la havaĵo kiun ŝi kunportas ĉe si, ŝi jam konsumis. Nun la duopo ankaŭ devas viviteni sin en la metropolo. Tamen ŝi havas nenan enspezon. Estas klare ke la riĉaĵo forkonsumiĝis tagon post tago kaj restis jam ne multe. Venis nenia informo de la instruitulo Wang. La novedzino sentis maltrankvilon. Ŝi petis ke la mamnutristino serĉu informon de ŝia patrino, kun espero ke ŝi revenu al hejmo de patrino kaj revidi siajn familianojn. Ekster ŝia atendo, pro perdo de la filino, la patrino ploris tagnoktojn kaj jam forpasis pro malsano antaŭ multaj tagoj.

La filo de ŝia onklino informiĝis pri la malapero de filino en la hejmo de sia inklino. Li timas ĉu okazos io malagrabla kaj rapide forkuris oni ne scias kien.

Informiĝinte pri tio, la novedzino unue ploregis, kaj poste diris interkonsiliĝe al sia mambutristino: “Nun ni havas neniun al kiu ni povas dependi. Estas ne malproksime la vojo de la metropolo Bianliang al la okcidento de Zhejiang-provinco. Ni devas kapti la ŝancon ke mi ankoraŭ havas iom da riĉaĵo, ni uzu tion kiel veturpagon por serĉi lin en lia hejmo. Alie, kion ni povus fari?”

Kaj ŝi petis ke la mamnutristino dungu unu boaton kaj ekveturis de la metropolo Bianliang.

Kiam ili venis al urbo Guangling, la mono de la novedzino jam elĉerpiĝis. La maljuna mamnutristino estis tro grandaĝa, pro la laciga vojaĝo kaj malbona vetero la maljunulino ekmalsaniĝis kaj devis kuŝi en lito.

Trovante nenian elirejon, la novedzino sentis grandan ĉagrenon kaj nur ploris. La tiel nomata urbo Guangling estas nuna Yangzhou, kiu estas vere prospera loko.

Antikva poeto iam versis ke “vojaĝu al Yangzhou en la tria monato pompa florsezono” kaj ankaŭ tiel ke “La Ponto Dudek Kvar Feinoj en helluna nokto ... Kie instruas fluton ludi l' hom' de jada belo? (Trad. Laŭlum)”

Tial la funkciuloj, ŝtatoficistoj kaj riĉaj sinjoridoj, kiuj volas trovi belajn kromedzinojn, ĉiuj venas al Yangzhou, pro tio sur stratoj de Yangzhou estas tre multe da svatistinoj.

Vidante ke bela virineto ploras en la boato, multaj svatistinoj konkure kolektiĝis pridemandi.

La virineto diris: “Mi venis de la metropolo Bianliang al Zhejiang por serĉi mian edzon. Neatendite mia mamnutristino forpasis ĉitie kaj elĉerpiĝis mia mono. Sen elirejo tial mi ploras.”

Interalie iu svatistino proponis: “Kial vi ne peti helpon de s-ro Su Da?”

La virineto demandis: “Kiu estas tiu Su Da?”

La svatistino respondis: “Su Da estas helpema homo en nia loko, li ja ofte donis helpojn al aliaj.”

En hasteco la virineto ne konsciis pri danĝero kaj ŝi petis: “Bonvole konigu lin al mi.”

La svatistino foriris por momento kaj revenis kun viro. Veninte al la boato de la virineto, la viro demandis ŝian travivaĵon kaj li tuj venigis aliajn homojn. La viro ordonis al liaj homoj ke ili portu la kadavron de la mortinta mamnutristino sur la bordo por sepulti. Poste li kalkulis kaj pagis la veturpagon al la boatmastro kaj forsendis lin.

Sekve la viro diris al la virineto: “Nun kolektu viajn pakaĵojn kaj loĝu en mia hejmo por kelkaj tagoj.”

La viro venigis portseĝon por la virineto. Vidante ke li aranĝis ĉion bonorde, la virineto supozis ke ŝi renkontis bonan homon. Siatempo ŝi ne havas alian elirejon kaj sekvis lin foriri kun trankvila animo.

Kiu sciis, ke tiu viro fakte estas granda fripono en urbo Yangzhou. Li faras ĉian fiagon inkluzive vivteni publikulinojn kaj funkciigi bordelon.

Kiam oni portis la virineton al la hejmo de la fripono, eliris kelkaj putinoj bonvenigi. Nur tiam la virineto konsciis ke ŝi falis en missorton sed ŝi jam ne povis elsavi sin kaj ricevis novan nomon Su Yuan por esti putino.

Sekvante sian patron kiu funkciis kiel ŝtatoficisto, instruitulo Wang vivis en Fujian-provinco por du jaroj. Nur poste li revenis al Zhejiang. Tiam estis la jaro de ŝtata ekzameno, instruitulo Wang do preparis pakaĵojn por veturi al nordo. Li vojaĝis preter urbo Yangzhou, kie la loka juristo estis lia kolego kaj aranĝis festenon regali instruitulon Wang. Al la festeno estas invititaj ankaŭ oficialaj publikulinoj, kiuj humile salutis kaj respektplene servis per vino. Inter la publikulinoj unu putino de tempo al tempo subrigardis al instruitulo Wang. Rimarkinte tion, instruitulo Wang ankaŭ rigardis al la putino kaj kun dubo pensis: “Kial ŝi aspektas tiel simila al la virino Cao en la metropolo?”

Li demandis pri ŝia nomo, sed la respondo estas tute malsama. Instruitulo observs ju pli detale kaj des pli konstatis ke tiu ĝuste estas la sama virino Cao.

Kiam la festeno iris ĝis duono, la putino Su Yuan alportis tason kaj petis ke instruitulo Wang

drinku. Tiam ili proksimiĝas vid-al-vide kaj bone rigardis. Kvankam ŝi ne kuraĝis eldiri tra buŝo tamen la koro ekpensas pri la intima pasejo. Ŝi ne povis plu reteni larmogutojn kiuj falis en la vintason.

Instruitulo Wang konsciis ke ŝi ĝuste estis la virineto Cao, kaj ankaŭ diris larmante: “Ho, mi pensas ke vi tre similas al Cao, jen vi ĝuste estas la sama identa! Sed kial vi troviĝas ĉitie?”

La virineto do detale rakontis al li ĉion post ilia disiĝo: Kiel ŝi veturis al Bianliang por serĉi lin, kiel elĉerpiĝis ŝia mono kaj kiel ŝi falis en putinecon kaj sentis grandan malĝojon.

Instruitulo Wang sentis grandan honton. Kortuŝite li larmis kaj rifuzis plu drinki. Sub preteksto de malsaniĝo li leviĝis kaj alvokis la virineton veni al lia loĝejo. Tiam ili ambaŭ elverŝis sian korajn vortojn kaj kundormis tiun nokton.

Je la sekva tago, la juristo de Yangzhou fari enketon pri la kulpoj de Su Da kiel li trompis virinon de bona familio kaj faris ŝin putino. Li kondamnis Su Da krimulo, liberigis Su Yuan libera de la putineco kaj sendis ŝin al instruitulo Wang kune foriri. Poste la virineto edziniĝis al Wang, naskis al li filon kiu poste fariĝis ministro.

Komence la instruitulo Wang levprenis la tegolon nur por ŝerco. Kiu scias ke tio donis al li bonan geedziĝon. Estis danĝere ke li preskaŭ ruinigis la vivon de la virineto. Feliĉe ili poste havis feliĉan finalon.

...

Nun ni parolu pri alia mirrakonto: Pro unu ŝerca frazo okazis miskomprenoj ĉe ambaŭ flankoj, la ŝercanto hazarde akiris bonan edzinon kiu kunvivis kun li dum tuta vivo. Tiu dua mirrakonto ja estas pli perfekta ol la unua. Estis jena poemo:

Li hazarde ŝercan frazon diris,
sed pro tio edzinon akiris.
Malvera bofilo iĝis vera,
Perdo utilas profitlivera.

Tiu dua mirrakonto okazis en Chenghua-erao (1465-1487), Ming-dinastio.

Vivis en Yuhang-gubernio de Hangzhou-prefektujo, Zhejiang-provinco, instruitulo nomata Jiang Ting kun adoltiĝa nomo Jiang Zhenqin. Li estas kvankam konfuzeano, tamen senbrida ŝercema, nemulte zorgante pri bagateloj. Jiang Zhenqin tre ŝatas viziti al belaj pejzaĝoj. Ofte okazis tiel ke li foriris de sia hejmo kaj vojaĝis fremdloken por tagoj aŭ monatoj. Iutage Jiang Zhenqin pensis: “Estas fama onidiro ke sur la vojo de Shanyin abundas belaj montoj kaj riveroj. Tie estas fama turisma loko. Ĉar Shaoxing-prefektujo troviĝas ne tro malproksime de mia hejmloko, kial mi ne vizitu tien vojaĝi?”

Hazarde du samlokanoj-komercistoj volas veturi al la sudo por komerci, Jiang Zhenqin do vojaĝis kune kun ili. Transveturinte Qiantang-riveron, ili prenis la noktan ŝipon de Xixing kaj post veturo de unu nokto ili jam venis al Shaoxing. La du komercistoj disiris por siaj negocoj, dume Jiang Zhenqin libere vojaĝis turisme al la famaj vizitindejoj Orkidea Pavilono, Kaverno de Dayu, Jishan-monto kaj la Spegula Lago. Li ekskursis ĉie kaj ĉiam kontente ĝissate.

La du komercistoj-amikoj ankaŭ finis sian negocon kaj ili denove kunvojaĝis reveni al hejmloko. La triopo hazarde iris en vilaĝo de Zhuji. Tiam iom post iom falis la vespera krepusko. Apudvoje de tempo al tempo vidiĝis verdaj kampoj sed neniu homo. Post momento, pluvo ekfalas de ĉielo. Neniu el la triopo kunportis ĉe si pluvombrelon. Ili do haste rapidis antaŭen ĝis ĉiuj spiregis. Tiumomente vidiĝis en la vilaĝo iu domo. De malproksime vidinte la domon, la triopo

ĝoje diris: “Nu, bone, bone. Lasu nin eviti pluvon tie.” Ili iris tiel haste ke faris du paŝojn unu paŝo. Kiam ili venis al la domo, ili trovis sin sub tegmento kontraŭ pluvo. El la du klapoj de pordo unu estis fermita dum la alia duonfermita.

Jiang Zhenqin paŝis antaŭen kaj per unu mano puŝis la pordon. La du amikoj diris averte al li: “Ne estu tro impertinenta! Ni povas eviti pluvon ĉitie. Sen scio pri la familio kial vi volas frapi sur la pordo? ”

Ĉar Jiang Zhenqin ofte estas serĉema, tiam li laŭte diris: “Kio malhelpas? Sciu, ke ĉitie estas la hejmo de mia bopatro. ”

La du amikoj ambaŭ diris admone: “Ne diru sensencaĵon kaj venigu malagrablajn! ”

Post nelonge la pluvo falis pli kaj pli forte. Subite malfermiĝis la pordo kaj aperis maljunulo.

Rigardu kiel la maljunulo aspektas:

Sur lia kapo sidas ĉapelo, kaj lia mano tenas lambastonon. En la ĉapelo estas bambua ĉapo kiu kovras iom da arĝentaj haroj. Kaj la kapon de lambastono kaptas kvin fingroj kiuj tre similas al sekaj zingibroj. Lia robo estas longa kaj larĝa. La maljunulo iras per paŝoj de gruo. La maljunulo portas ŝuojn kun altaj kalkanumoj kaj iras kiel testudo. Ni facile supozas ke li similas al la famaj ermitoj Avo Huangshi kaj tiuj en Shangshan-monto. Fakte tiu maljunulo havas familian nomon Tao, li estas riĉulo en la vilaĝo Zhuji. La maljunulo estas kaj honesta kaj justama, gastama serioza kaj sincera.

Komence, en vespero la maljunulo volas iri al la pordo fermi. Tiam li aŭdis parolojn deekstere kaj li sciis ke oni evitas pluvon ĉitie. Pro malfrua iro je unu paŝo la maljunulo bone aŭdis la ŝercon de Jiang Zhenqin. Enirinte internen, la maljunulo diris tion al sia edzino kaj familianoj. Ili ĉiuj diris: “Ho, kiel malice kaj senbrideme li diras! Ni ne akceptu ilin!”

Nun, vidante ke la pluvo pli kaj pli fortiĝis, la maljunulo sentis maltrankvilon, li ja volas enlasi la pluv-evitantojn, tamen ankoraŭ sentas malkontenton kontraŭ tiu kiu diris malĝentile ŝerce. Post momento da hezito, la maljunulo fine eliris.

Vidante ke tie staras tri homoj, la maljunulo demandis: “Kiu el vi diris ke mi estas lia bopatro?”

Aŭdinte la demandon, Jiang Zhenqin sentis sian parolon tre maldeca kaj tuj ruĝiĝis ĝis kolo.

La du amikoj ambaŭ plendis kontraŭ li: “Via malĝentila diro vere maldecas.” Vidante tian scenon, la maljunulo komprenis ke li estas tiu senĝentila parolinto. Kaj li turnis sin al la du gastoj: “Se vi ne sentas mian hejmon maltaŭga, mi sincere invitas vin eniri iom ripozi. Dum tiu juna homo, laŭ lia propra diro, li devas estis el la pli juna generacio same kiel miaj idoj, do ne taŭgas kiel mia gasto. Do li ne eniru kaj nur restu ĉitie. ”

La du gastoj ankoraŭ volas diri iom da komplimentoj, la maljunulo tiris ilin eniri la domon. Kaj, tuj post kiam ili eniris, la maljunulo fermis la grandan pordon.

Vole-nevole, la du gastoj devis veni al la salono kaj prezentis sian nomon. Ili ankaŭ rakontis kiel ili renkontis pluvon kaj evitis sub la tegmento.

La maljunulo ankoraŭ en malkontento diris: “Antaŭ nelonge via amiko dum vojaĝo kondukis tro frivole. Ĉu tio estas taŭga por ĝentilulo? Vi du sinjoroj prefere senigu vian amikecon kun li.”

La du gastoj proparolis por li, dirante: “Tiu junsinjoro havas familian nomon Jiang. Li parolis nedece sed senintence ofendi vin estimatan avon. Bonvole pardonu lin! ”

Tamen la maljunulo ankoraŭ ne povis liberigi sin de la kolero. Post momento, la maljunulo regalis la du gastojn per vino kaj festeno, sed li tute ne menciis pri la kromhomo kiu ankoraŭ atendas ekster pordo.

La du gastoj sentis neatenditan ĝojon pro la regalo. Vidante ke la maljunulo efektive koleras, tial ili ne povis pretendi pri invito al s-ro Jiang. Do, ili nur povas mem manĝi kaj drinki.

Jiang Zhenqin estis rifuzita ekster la fermita pordo. Li pensis pri sia nedeca parolo kun pento. Nun li sola staras sub la tegmento. Estis malhele kaj solece. Li volas foriri sola. Sed unue la pluva vetero ankoraŭ daŭras malhele, due li ne kuraĝas iri sola. Vole-nevole li devis regi sin mem dum pacienca atendado.

La pluvo iom post iom ĉesiĝis. Inter la nubflokaj jen leviĝis la luno. Li atente subaŭskultis kaj trovis ke la sonoj silentis interne.

Jiang pensis: “Supozeble nun ili jam endormiĝis. Kial mi ankoraŭ atendi ĉitie? Prefere sub heleta lunlumo mi foriru.”

Kaj li denove pensis: “Kvankam la maljunulo malkontentas kontraŭ mi, tamen kial la du amikoj ĝuante regalon forlasos min? Eble ili trovos por mi tranoktejon. Do mi atendu ankoraŭ momenton!”

Dum Jiang tiel hezitis, subite li aŭdis ke iu mallaŭte diris post la pordo: “Ne foriru! ”

Jiang Zhenqin pensis: “Mi ja supozis ke ili ne forgesu min.” kaj respondis: “Jes. Mi ne foriru! ”

Post momento, Jiang refoje aŭdis la mallaŭtan voĉon: “Estas io elportata. Bonvole bone tenu ilin. ”

Jiang Zhenqin pensis: “Ho, kia ago? Ili ricevis senpagan manĝon kaj nun prenas ion de la mastro. Tro sendankema duopo! ”

Tamen li respondis: “Nu, bone.” Li staras tie atendente. Kaj jen trans muro vere ĵetiĝis du objektoj. Jiang haste iris antaŭen rigardi kaj trovis ke tio estas du pakaĵoj. Per mano li levmezuris kaj sentis tion sufiĉe peza, kun blokoj, verŝajne estas objektoj el oro aŭ arĝento.

Timante ke alia homo malfermos pordon kaj postkuros lin, Jiang Zhenqin haste metis la du pakaĵojn sur sian ŝultron kaj rapidis antaŭen.

Tiel li rapidis pli ol cent paŝojn. Jiang returnis sin kaj trovis la pordon iom malproksima. Li haltis kaj observis tie. De malproksime Jiang vidis ke eltrans la muro saltis du homoj.

Jiang pensis: “Ho, ili la duopo ankaŭ alvenas. Timante ĉu venos aliaj postkurantoj, mi foriru la unua kaj ne atendu ilin ĉitie. ”

Jiang eklevis siajn piedojn forrapidi. Tamen la du sekvantoj iris tute senurĝe. Ili nur malrapide sekvis post li.

Post iom da irado, Jiang Zhenqin pensis: “Se ili ĝisatingos min, certe postulos ke ni kune dividu la objektojn en la pakaĵoj. Nun, profitante ke ili ankoraŭ ne atingas min, prefere mi malfermu la pakaĵojn rigardi. Supozeble ĉio estas akirata nejuste. Mi ja povas kaŝi iom da pli bonaj el tio.” Jiang Zhenqin ekhaltis. Li malfermis la pakaĵojn. Elektinte iom da pli valoraj oraĵoj li faris tion alia pakaĵo, dume li pakis la malpli valorajn kiaj monoj kaj tolaĵoj, li ankoraŭ restigis ilin en la malnova pakaĵo. Nur tiam li komencis denove iri kaj rimarkis ke la du postirantoj ankoraŭ ne alvenas. Ĉar la du sekvantoj tiel iras: Se Jiang Zhenqin iras, ili ankaŭ iras; se Jiang Zhenqin haltas, ili ankaŭ haltas. Ili nur postsekvas en malhelo, ne iris pli proksimen. Tial post irado de duona punkto, ili disiĝis ankoraŭ je distanco atingebla de unu sagpafo.

Jen iom post iom tagiĝis. Nur tiam la du sekvantoj pli rapidigis sian iradon kaj proksimiĝis al Jiang Zhenqin. Jiang alparolis al ili: “Venu kaj ni povos iri kune.” Kiam la du sekvantoj venas antaŭ Jiang Zhenqin, li rigardis kaj sentis grandan surpriziĝon: ĉar la venantoj ne estas tiuj du amikoj kiuj kuniris hieraŭ. Nun la sekvantoj estas du virinoj, el kiuj la unua havas kaptukon kaj

bluan silkan robon, kaj aspektas tre bela. Dum la alia virino portas harpinglon kaj nigran tolveston, laŭveste aspektas servistino.

La virino zorge observis, ankaŭ sentis grandan surprizon. Ŝi rapide turnis sin por foriri, sed Jiang Zhenqin ekkaptis la belan virinon kaj diris: “Kien vi volas foriĝi? Rapide sekvu min, ni ja povos interkonsiliĝi; alie, se vi ne obeos min, mi denuncos vin al magistrato!”

La virino mallevis sian kapon kaj vole-nevole iris postsekvante lin.

Kiam ili venis al hotelo, Jiang Zhenqin elektis kvietan kaj puran ĉambron loĝi, kaj li mensoge diris al la mastro de la hotelo ke ili estas geedzoj pilgrimantaj kaj volas aĉeti matenmanĝaĵon ĉitie. Vidante ke ili estas viro kun virino kaj servistino, la mastro de la hotelo havis neniom da suspekto kaj mem foriris prepari matenmanĝon.

Jiang Zhenqin demandis al la fraŭlino pri ŝia deveno, kaj tiu respondis jene: “Mi havas familian nomon Tao, kaj propran nomon Youfang (Arometa). Mi estas la filino de la mastro kiu regalis vin hieraŭ. Mia patrino havas familian nomon Wang. En mia infaneco miaj gepatroj jam donis promeson de mia edziniĝo al la filo de samloka familio Chu. Kiu atendis ke li la fianĉo blindiĝis kaj pro tio mi ne volas geedziĝi kun li. Mi havas kuzon en familio Wang, li estas juna kaj bela, mi ja volas edziniĝi al li. Tial mi submendis rendezuon kun li ke ni kune forkuru ĉi-nokte al fora loko. Dum tago mi ne ricevis la respondon de mia kuzo Wang. Tamen okaze de vesperiĝo, mia patro subite eniris kaj kriis ‘Nun ekster nia pordo estas homo, kiu anoncas ke ĉitie estas la hejmo de lia bopatro. Ho, kiel abomeninda estas tia sensencaĵo!’”

Mi pensis: “Ho, certe alvenas mia amata kuzo Wang laŭ mia mendo. Mi haste faris pakaĵojn kaj invitis la servistinon akompani min. Ni haste transmuriĝis kaj vidis ke vi iris antaŭe portante pakaĵojn. Mi pensis: Ho certe li estas tiu mia kuzo. Timante ke aliaj homoj rimarkis nian forkuron, tial dum la tuta vojo ni ne kuraĝis proksimiĝi al vi. Venante ĉitien mi scias ke okazis miskompreno. Nun jam foriris tiu kuzo atendata de mi kaj mi ne povas reveni serĉi lin. Tial en senelirejo mi nur devas sekvi vin.”

Jiang Zhenqin tre ĝojis kaj li diris: “Ho, tio okazis laŭ antaŭdestino kaj miaj vortoj efikis. Feliĉe mi ankoraŭ ne edziĝis. Do, estus trankvila! Ni kune revenu al mia hejmo!” Ili matenmanĝis, ankaŭ la servistino manĝis. Jiang Zhenqin pagis la tranoktan monon al la hotela mastro kaj luis boaton. Sen atendi neniun alian kunvojaĝanton, per la sama boato li rekte revenis al la hejmo en Yuhang-gubernio. Responde al demandoj de familianoj Jiang Zhenqin nur diris ke la virinon li prenis dum vojaĝo.

Post veno al la hejmo de Jiang Zhenqin, tiu virino kondukis al ĉiuj familianoj tre bonvirte ĝentila kaj ŝi vivis kun Jiang Zhenqin en granda konkordo. Post unu jaro, ŝi jam naskis unu filon. Tamen ĉiufoje, je mencio pri ŝiaj gepatroj, ŝi malĝoje larmis.

Iutage, la edzino diris al Jiang Zhenqin: “Siatempe mi ne volis edzinigi min al la blinda fianĉo, tial mi faris nedecajn agojn. Nun mia korpo jam apartenas al vi. Pri tio mi sentas nenian penton. Tamen miaj gepatroj ambaŭ estas en maljuneco sen apogo. Perdinte min ili certe dronis hejme en granda malĝojo. Nun, post pli ol unu jaro, mi havis neniom da informoj pri ili kaj mi neniam povis forgesi ilin. Se mia hejmsopiro tiel daŭros, mi supozas ke tre eble mi malsaniĝos. Mi memoras ke miaj gepatroj rigardis min ĉiam tre kara trezoro. Tial se ili hodiaŭ revidos min, ili nur sentas grandan ĝojon kaj havos neniom da malkontento kontraŭ mi. Ĉu vi povus iel serĉi informojn pri miaj gepatroj?”

Post momento da cerbumo, Jiang Zhenqin diris: “Ĉitie estas instruisto sinjoro Ruan. Li nomiĝas Ruan Taishi. S-ro Ruan estas mia amiko. Li ofte vojaĝis inter Zhuji kaj ĉitie. Lasu min

interkonsiliĝi kun li. ”

Kaj Jiang Zhenqin vizitis al sia amiko s-ro Ruan kaj diris ĉion detale al li.

Ruan Taishi respondis: “Ho, mi scias ke tiu maljunulo estas vere honesta aĝulo. Mi havis kelkajn intervidiĝojn kun li. Lasu min trovi iun ŝancon viziti al li por transdoni informojn pri via vivo kaj trovi bonan daŭrigon. Estu trankvila! ”

Jiang Zhenqin kore dankis al li kaj per tio respondis al sia edzino.

Nun ni revenu al la interrompita rakonto. Tiun nokton Avo Tao restigis la du gastojn tranokti en lia hejmo kaj la sekvan matenon li regalis ilin per matenmanĝo. La du gastojn diris milojn da dankaj vortoj, faris adiaŭon kaj leviĝis por foriri.

La maljunulo akompanis ilin ĝis la pordo kaj ridante diris: “Ho, mi ne scias kie tranoktis via senbridema amiko lastnokte. Eble li suferis iom da ĝeno, kio efikas kiel puno al lia senĝentila ago. ”

La du gastoj diris: “Ne povante ĉiam atendi ekster pordo, tre eble li foriris la unua. Se ni revidos lin ni certe diris iom da plendoj al li. Bonvole ne plu pensi pri tio. ”

La maljunulo diris: “Ho, mi montris min iom senpacienca lastnokte. Hieraŭ li jam ricevis suferon. Kial mi ankoraŭ pensos pri li!” Tiel ili diris adiaŭon reciproke kaj disiĝis.

Kiam la maljunulo eniris pordon, servistino haste rapidis al li kaj anhele raportis: “Ho ve, paĉjo! Malbona informo: Malaperis la franjo! ”

Surprizite la maljunulo demandis: “Kio okazis?” La maljunulo stumble eniris la ĉambron kaj li vidis ke lia edzino ploregis vokante filinon kaj falis teren.

La maljunulo demandis pli detale kaj lia edzino respondis: “Lastnokte nia filino dormis en ŝia ĉambro kiel kutime. Hodiaŭ matene, ĉar estas gastoj en nia domo, mi iris al kuirejo aranĝi matenmanĝon. Tiam mi ne vidis ellitiĝon de nia filino. Poste, kiam foriris la gastoj, mi sendis alvoki nian filinon veni ĉitien matenmanĝi. Poste, kiam foriris ĉiuj gastoj, mi trovis ke ĉiuj kofroj en ŝia ĉambro estas malfermitaj. Malaperis kien mi ne scias eĉ la servistino nomata Shicui!”

Ŝokite la maljunulo demandis: “Sed pro kio?”

Iu el mamnutristinoj diris: “Ĉu eble la gastoj kiuj tranoktis ĉe ni estas fiuloj kaj ili trompstelis nian fraŭlinon en nokto? ”

La maljunulo kriis malkonsente: “Sensenĉaĵo! Ĉiuj gastoj venas ja unuafoje. Du el ili tranoktis en nia gastĉambro kaj hodiaŭmatene foriris bonorde. Kiel ili povus fari trompŝteladon? La alia gasto estis rifuzita de mi, eĉ ne eniris nian domon, kio do koncernas lin? Mi konjektas: eble mia filino havis sekretan renduvuon kun alia homo, hodiaŭ, profitante la ŝancon de gastaj vizitoj, ŝi forkuris en brua stato de mia hejmo. Ĉu vi rimarkis ion nenormalan en ŝia ĉiutaga konduto?”

“Ho jes! Vi bone konjektas.” Iu vartistino respondis: “Mi rimarkis ke nia fraŭlino ofte malĝoje larmis pro sia fianĉiniĝo al blindulo. Ŝi havis tamen intiman rilaton kun sinjorido Wang en najbara domo. Ŝi ofte sendis la servistinon Shicui interkomuniki. Nun ĉu ŝi forkuris kun la juna sinjorido Wang?”

Tiu diro ŝajnas konvinka kaj la maljunulo sekrete sendis homon al la hejmo de Wang subobservi, sed tie okazis nenio nenormala.

La maljunulo ne povas kompreni kaj ordonis: “La familian malhonoron nepre ne disvastigu eksteren! Se la blinda fianĉo en Chu-familio konsentas nuligi la gefianĉigon, estus tre bone. Se li ne konsentus pri la nuligon, mi volonte rekompenci lin per unu servistino. Tamen, seniĝi mia propra filino ĉe mi, la hejmo fariĝas tro kvieta.”

La maljunulo tiel diris al sia edzino, kiu nur ploradis senĉese. Poste la blindulo en Chu-familio

mortis. Tio kortuŝis la gemaljunulojn plori ankoraŭ kelkafoje, kaj ili suspiris dirante: “Se li mortus pli frue je unu jaro, eble la situacio de mia filino estus tute alia.”

Tiel forpasis pli ol unu jaro, iutage la maljunulo ricevis vizitkarton de iu s-ro Ruan Taishi de Yuhang.

La maljunulo rapide eliris bonvenige kaj salutis: “Ho, kiu favora vento blovas vin ĉitien?” S-ro Ruan Taishi respondis: “Jam longan tempon mi ne vizitis al karaj amikoj en via loko. Hodiaŭ mi hazarde havas libertempon, tial mi veturis trans la riveron por saluti amikojn.”

La maljunulo do ordonis aranĝi festenon regali la gaston. Dum ili kundrinkas vinon, ili ankaŭ interŝanĝis lastajn novaĵojn, ĉu fidindajn aŭ nefidindajn.

S-ro Ruan diris: “Antaŭ unu jaro okazis en via loko novaĵo, aŭtentika.”

La maljunulo demandis: “Pri kio?”

S-ro Ruan daŭrigis: “Estas juna amiko, kiu eliris ekskursi. Kiam li iras hejmen reveni, pro iu ŝerca frazo li akiris edzinon kaj nun ili la geedzoj vivas feliĉe. Laŭ onidiro tiu novedzino estas lokano de via hejmloko. Ĉu vi aŭdis pri tiu novaĵo?”

La maljunulo demandis: “Ĉu vi scias kian familian nomon havas la novedzino?”

S-ro Ruan Taishi respondis: “Laŭ onidiro ŝi ankaŭ havas la familian nomon Tao.”

Forte surprizite la maljunulo demandis: “Ho, ĉu ŝi estas mia filino?”

S-ro Ruan Taishi daŭrigis: “Ŝi havas karesnomon Youfang (Arometa) kaj aĝas 18-jara. Ŝia servistino nomiĝas Shicui.”

Kun rondigitaj okuloj la maljunulo diris: “Ho, efektive ŝi estas mia filino. Sed kiel ŝi fariĝis novedzino de la junulo?”

S-ro Ruan Taishi respondis: “Ĉu vi ankoraŭ memoras la pluvan tagon? La junulo frapis sur via pordo kaj diris ke via domo estas la hejmo de lia bopatro. Vi fermis la pordon kaj rifuzis lin eniri.”

La maljunulo respondis: “Ho jes! Sed mi ne konis lin antaŭe kaj li estis rifuzita de mi resti ekstere. Sen komunikaĵa vojo, mi ne scias, kial mia filino foriris sekvi lin tiun nokton?”

Sinjoro Ruan do detale rakontis kion Jiang Zhenqin diris al li. Ruan diris: “Dum unu flanko parolis maldece, la alia flanko koleris kaj la tria flanko miskomprenis. La triflankaj eraroj kune okazigis la epizodon vere mirinda! Nun ili jam havas infanon. Ĉu vi volantas intervidiĝi kun ili?” La maljunulo respondis: “Jes, tre volonte.”

Tiam la edzino de la maljunulo s-ino Wang ankaŭ bone aŭdis ĉion malantaŭ ekrano. Ne povante plu regi sin, ŝi elsaltis kaj malgraŭ antaŭ nebone konata gasto ŝi ploregis. Ŝi riverencis profunde al s-ro Ruan dirante: “Ni gemaljunuloj havas nur tiun filinon unikan. Post ŝia malapero, mi plurfoje ploregis ĝis sveno kaj mi eĉ ne volas plu vivi. Se vi respektata sinjoro povas doni al ni intervidiĝon kun mia filino, ni certe rekompencos vin kun granda danko!”

Tiam s-ro Ruan diris: “Kvankam vi maljuna paro volas intervidiĝi kun via filino, tamen pro la timo ke maljuna sinjoro plendos kontraŭ li, via bofilo eble ne kuraĝas intervidiĝi kun vi.”

La maljunulo respondis: “La intervidiĝo donas al ni grandan feliĉon, pro kio mi ankoraŭ plendos kontraŭ li?”

S-ro Ruan diris: “Ankaŭ via bofilo estas el bona familio, neniom malinda por via filino. Se vi nun havas neniom da plendo, mi invitas vin tuj veturi kun mi al la hejmo de via bofilo.”

Kaj la maljunulo petis ke Jiang Zhenqin kun la edzino kune veturi al la hejmo de bogepatroj. Ankaŭ la filino tre volas revidi sian patrinon, tial ili kune veturis al Zhuji-vilaĝo. Okaze de la revido de la patrino kaj filino, la maljunulino veis, dirante: “Mi ja supozis ke por ni estas nenia

ŝanco de revido en la kuranta vivo, kiu povas antaŭscii pri hodiaŭa okazintaĵo? ”

Ankaŭ la vartistinoj en la hejmo ĉiuj ploregis kortuŝite.

Post fino de ilia plorado, Jiang Zhenqin humile salutis al la bogepatroj petante ilian pardonon: “Kiam mi kun amikoj staris ekster la pordo de via domo, mi hazarde diris ŝercajn vortojn al miaj amikoj. Mi ne atendis ke tiuj vortoj ofendis la bopatron kolerega. Mi ankaŭ ne atendis ke via filino miskomprenis la ŝercon vera kaj tiel realigis la deziron. Nun mi rememoras tion, ĉu mi povus antaŭscii ke mi havas hodiaŭan feliĉon? Ho, ĉio okazis pro hazardo kaj kore petas vian grandaniman senkulpigon al mi. ”

La maljunulo ridegis, dirante: “Je kio vi kulpas? Vi diris tiajn vortojn ja laŭ deziro de la Ĉielo, vi agis laŭ antaŭdestino. Kian kulpon vi havas?”

Dum ili interparolis, s-ro Ruan ankaŭ preparis sian donacon kaj venis al la pordo gratuli.

La maljunulo Tao do preparis kolorajn silkaĵojn kaj arĝentojn. Li petis ke s-ro Ruan funkciuu la rolon de svatanto. La maljunulo ankaŭ aranĝis grandajn festenojn por siaj parencoj kaj solenan nupton por Jiang Zhenqin kaj lia edzino. La bogepatroj donis abunde da doto al sia filino, sendis la junan paron reveni hejmen kie ili kunvivis ĝis oldaĝo.

Se la instruitulo Jiang Zhenqin ne faris tiun ŝercon, sekve li ne estis rifuzite ekster la pordo. La maljunulo certe ankaŭ invitis lin endomen kundrinki. Kiel li povus akiri la bonan noveladon? La virino certe vivos kune kun alia homo. Tial ni povas konvinkiĝi ke la geedziĝo okazis laŭ antaŭdestino kaj la Ĉielo gvidas ĉion.

Tiu ĉi rakonto plej frue aperis en la libro <Liberaj Notoj de la Okcidenta Lignohakisto> verkita de Zhu Zhishan(1461-1527) kun sufiĉe interesa intrigo. Bedaŭrinde poste aperis sencerbulo, kiu verkis alian libron <Geedza Litkovrilo>. Tiu libro fakte estas kunmiksaĵo de kelkaj similaj epizodoj pri trompŝtelo de novgeedzoj kaj ĝi legiĝas tre konfuza. Tial hodiaŭ mi faras reordigon facile legeblan por ke ĝi denove disvastiĝi en la mondo. Estas jena poemo:

Pro ŝercvorto venis al li edzino.

Ĉio okazis laŭ antaŭdestino.

Okazis miskomprenoj kaj eraro,

Tion mi verkas en ĉi novelaro.

(Guozhu tradukis 2016-04-10

el la <Unua Kolekto de Mirigaj Rakontoj> de Ling Mengchu (1580~1644))

====

Puŝkin:

LA NEĜA BLOVADO

En la fino de l' jaro 1811a, en epoko al ni memorinda, vivis en sia vilaĝo Nenaradovo la bona Gavriilo Gavriloviĉ R.

Li gloriĝis en la tuta ĉirkaŭaĵo pro gastamo kaj koreco; la najbaroj ĉiuminute veturadis al li por manĝi, trinki, ludi kun lia edzino Praskovja Petrovna po kvin kopekoj je l' bostono; kaj kelkaj el ili - por rigardi ilian filineton Marion Gavrilovna'n, gracion, palan kaj deksepjaran junulinon. Ŝi estis rigardata kiel riĉa fraŭlino, kaj multaj antaŭdecidis ŝin por si aŭ por siaj filoj.

Mario Gavrilovna estis edukita sur francaj romanoj kaj tial kompreneble jam amanta.

La objekto, elektita de ŝi, estis malriĉa oficiro, kiu sin trovis forpermeso en sia vilaĝeto. Estas kompreneble per si mem, ke la juna homo brulis egale per ama fajro, kaj ke la gepatroj de lia amata, sciiginte ilian duflankan amon, malpermesis la filinon eĉ pensi pri li, kaj lin ricevadis pli malbone ol eksigitan juran alsidanton.

Niaj amantoj estis en korespondado, kaj ĉiun tagon ili sin vidis je kvar okuloj en pina arbareto aŭ ĉe l' malnova preĝejo. Tie ili ĵuradis unu al la alia eternan amon, plendadis je la sorto kaj faradis multoblajn projektojn. Korespondante kaj interparolante tiusence, ili (kio estas tre natura) alvenis al la jena decido: se ni unu sen la alia ne povas vivi, kaj la volo de la senkompataj gepatroj baras nian feliĉon, ĉu ni ne povas veni al la celo ankaŭ sen ĝi? Oni komprenas, ke tiu ĉi feliĉa penso venis unue en la kapon de l' juna homo, kaj ke ĝi multe plaĉis al la romana fantazio de Mario Gavrilovna.

Venis la vintro kaj ĉesigis iliajn revidojn, sed la korespondado fariĝis tiom pli viva. Vladimiro Nikolajeviĉ en ĉiu letero ŝin petegis ke ŝi transdonu sin al li, edziĝu je li sekrete, kaŝu sin kelkan tempon kun li, kaj poste ili ĵetus sin al la piedoj de la gepatroj, kiuj nature estus fine tuŝitaj per la heroa konstanteco kaj la malfeliĉo de la amantoj kaj dirus al ili certe: “infanoj, venu al niaj koroj!” Mario Gavrilovna longe ŝanceliĝadis; multaj projektoj de l' forkuro estis forĵetitaj. Fine ŝi konsentis: en certigita tago ŝi devis ne vespermanĝi, sed foriĝi en sian ĉambron el la ŝajnkaŭzo de l' doloro je l' kapo. Ŝia servanta knabino estis en la komploto; ili du devis eliri en la ĝardenon trans la posta balkona ŝtuparo, trovi pretigitan glitveturilon, sidigi sin en ĝi kaj veturi ĉirkaŭ kvin verstojn de Nenaradovo, en la vilaĝon Ĵadrino, rekte antaŭ la preĝejon, kie Vladimiro jam devis ilin atendi.

Antaŭ la decidanta tago Mario Gavrilovna ne dormis tutan la nokton; ŝi ordadis kaj kunligadis sian tolaĵon kaj vestaĵon, skribis longan leteron al unu sentema fraŭlino, sia amikino, alian al siaj gepatroj. Ŝi diris adiaŭ al ili en la plej kortuŝantaj vortoj, senkulpigis sian eraron per la nevenkebla forto de la ama sento kaj finis per tio, ke la plej feliĉa minuto de l' vivo estos por ŝi tiu, kiam estos permesita al ŝi ĵeti sin al la piedoj de la plej karaj gepatroj.

Sigelinte la du leterojn per Tula sigelilo, sur kiu estis elformitaj du brulantaj koroj kun konvena surskribo, ŝi ĵetis sin sur la liton mallonge antaŭ la lumiĝado de l' tago, kaj ekdormetis; sed ankaŭ tie ĉi teruraj sonĝaj fantazioj ĉiuminute ŝin vekadis. Jen ekŝajnis al ŝi, ke en tiu sama minuto, kiam ŝi sidiĝis en la glitveturilon por veturi al la edziĝo, la patro ŝin ekhaltigis, kun turmenta rapideco ŝin trenis sur la neĝo kaj ĵetis en malluman kaj senfundan subteraĵon... kaj ŝi flugis malsupren kun neklarigebla mortiĝado de l' koro... jen ŝi vidis Vladimiron, kuŝantan sur la herbo, palan kaj sangantan. Mortante, li petegis ŝin per voĉo iranta tra l' koro, ke ŝi rapidu por lin edzigi... Aliaj malbelaj, sensecaj sonĝaj vidaĵoj sin portis antaŭ ŝi unu post alia. Fine ŝi levis sin el la lito, pli pala ol kutime, kaj kun ne-preteksta doloro je l' kapo.

La patro kaj la patrino ekvidis ŝian maltrankvilecon; ilia karesa zorgado kaj la senĉesaj demandoj: kio estas al vi, Manjo? Ĉu vi ne estas malsana, Manjo? - disŝiradis al ŝi la koron.

Ŝi penis ilin trankviligi, montri sin ĝoja, kaj ne povis. Venis la vespero. La penso, ke jam je l' lasta fojo ŝi pasigas tagon en la mezo de sia familio, premis ŝian koron. Ŝi estis apenaŭ viva; sekrete ŝi diris adiaŭ al ĉiuj personoj, al ĉiuj objektoj, kiuj ŝin ĉirkaŭadis.

La vespermanĝo estis enportita; ŝia koro forte ekfrapis. Per tremanta voĉo ŝi diris, ke ŝi ne havas apetiton por vespermanĝi kaj komencis adiaŭi je la patro kaj la patrino. Ili ŝin kisis kaj, kiel kutime benis; ŝi apenaŭ ne ekploris.

Veninte en sian ĉambreton, ŝi ĵetis sin sur la seĝon kaj verŝis varmegajn larmojn. Ŝia knabino

konsilis al ŝi, ke ŝi trankviliĝu kaj kuraĝiĝu. Ĉio estis preta. Post horduono Manjo devis por ĉiam forlasi la domon gepatran, sian ĉambron, la trankvilan vivon fraŭlinan. Ekstere estis neĝa blovado; la vento fajfis, la lignaj fenestraj kovriloj tremadis kaj frapadis; ĉio ŝajnis al ŝi kiel timigadoj kaj malfeliĉaj antaŭsignoj. Baldaŭ en la domo ĉio trankviliĝis kaj ekdormis.

Manjo ĉirkaŭkovris sin per ŝalo, metis sur sin varman superveston, prenis en la manon sian kesteton kaj eliris sur la postan verandon. La servantino portis post ŝi du kuneligajojn. Ili eliris en la ĝardenon. La neĝa blovado ne trankviliĝis, la vento blovis kontraŭen, kiel penante haltigi la junan krimulinon. Fine ili alvenis al la fino de l' ĝardeno.

Sur la vojo glitveturilo ilin atendis. La ĉevaloj, trafrostitaj, ne volis stari trankvile sur la loko, la veturigisto de Vladimiro promenadis antaŭ la glitveturila turnilo moderigante ilian fajrecon. Li helpis la sinjorinon kaj ŝian servistinon sidiĝi kaj kuŝigi la kuneligajojn kaj la kesteton, prenis la kondukilojn en la manojn kaj la ĉevaloj fluge ekkuris. Transdonante la fraŭlinon al la zorgado de l' sorto kaj al la arto de Tereŝka, la veturigisto, ni turniĝos al nia juna amanto.

La tutan tagon Vladimiro estis en veturado. Matene li estis ĉe l' Ĵadrina pastro; kun malfacilo ili venis al konsento. Poste li veturis serĉi atestantojn por la edziĝo inter la najbaraj vilaĝestroj. La unua, al kiu li venis, la eksa kvardekjara standardestro Dravin, konsentis kun plezuro. Tiu ĉi afero, li diris, rememorigis al li la pasintajn tempojn kaj la husarajn ŝercetojn. Li invitis Vladimiron resti ĉe li por tagmanĝi kaj certigis lin, ke trovi la du aliajn atestantojn, ne estos malfacile. Efektive tuj post la tagmanĝo venis la geometriisto Ŝmidt kun lipharoj kaj pikradetoj ĉe la botoj, kaj la filo de kapitano de l' ĵandarmaro, knabeto deksesjara, kiu antaŭ kelka tempo aliĝis al la ulanoj. Ili ne sole alprenis la proponon de Vladimiro, sed ankaŭ ĵuris la pretecon oferi al li la vivon. Vladimiro ĉirkaŭprenis ilin kun neesprimebla ĝojo kaj forveturis la domon por sin prepari.

Jam longe mallumiĝadis. Li elsendis sian fidelan Tereŝka'n en Nenaradovon kun sia trio da ĉevaloj kaj kun detala, vasta ordono; por si li ordonis prepari malgrandan glitveturilon unuĉevalan, kaj tute sola, sen veturigisto, li forveturis Ĵadrinon, kien post du horoj devis ankaŭ alveni Mario Gavrilovna. La vojon li konis, kaj la tuta veturo devis daŭri nur dudek minutojn.

Sed apenaŭ Vladimiro estis elveturinta en la kampon, eklevis sin vento kaj fariĝis tia neĝa blovado, ke li nenion vidis. En unu minuto la vojo estis kovrita de neĝo, la ĉirkaŭaĵo perdiĝis en la nebulo malklara kaj flaveta, tra kiu flugadis blankaj flokoj de l' neĝo; la ĉielo kuniĝis kun la tero; Vladimiro ekvidis sin sur la kampo kaj vane li volis denove eltrovi la vojon; la ĉevalo paŝis rekte antaŭen kaj ĉiuminute jen ĝi veturadis sur neĝan amason, jen faladis en kavon; la glitveturilo ĉiuminute sin renversadis. Vladimiro nur penis ne perdi la veran direkton. Sed ŝajnis al li, ke jam pasis pli ol duonhoro kaj li ankoraŭ ne alveturis al la Ĵadrina arbetaro. Pasis ankoraŭ ĉirkaŭ dek minutoj, la arbetaro ĉiam ankoraŭ ne estis videbla. Vladimiro estis veturanta tra kampo tranĉita per profundaj kavoj. La neĝa blovado ne trankviliĝadis, la ĉielo ne ellumiĝadis. La ĉevalo komencis laciĝi kaj de li la ŝvito faladis kiel hajleroj, malgraŭ ke li ĉiuminute estis ĝis la duono en la neĝo.

Fine li ekvidis, ke li veturis en malvera direkto. Vladimiro haltis; li komencis pripensadi, prezentadi al si kaj certiĝis, ke li devis preni la vojon dekstren. Li ekveturis dekstren. Lia ĉevalo apenaŭ paŝadis. Jam pli ol unu horon li estis en vojo. Ĵadrino devis esti proksima. Sed li veturis, veturis, kaj la kampo ne havis finon. Ĉie neĝaj amasoj kaj kavoj; ĉiuminute la glitveturilo sin renversadis, ĉiuminute li ĝin levadis. La tempo pasadis, Vladimiro komencis forte maltrankviliĝi.

Fine en flanko sin montris io nigra. Vladimiro tien sin turnis. Proksimiĝante li ekvidis arbetaron. Glor' al Dio, li ekpensis, nun ĝi estas proksima. Li veturis al la arbetaro, esperante

baldaŭ trovi la konatan vojon aŭ ĉirkaŭveturi la arbetaron: Ĵadrino estis tuj post ĝi. Baldaŭ li trovis la vojon kaj enveturis en la mallumon de l' arboj, nudigitaj de la vintro. La vento ne povis tie koleregi; la vojo estis glata; la ĉevalo reprenis la kuraĝon kaj Vladimiro trankviliĝis.

Sed li veturis kaj Ĵadrino ne estis videbla; la arbetaro ne havis finon. Vladimiro kun teruro ekvidis, ke li estis enveturinta en nekonatan arbaron. Malespero lin prenis. Li ekbatis la ĉevalon; la bedaŭrinda besto ekiris kure, sed baldaŭ ĝi komencis iri paŝe, malgraŭ ĉiuj penoj de la malfeliĉa Vladimiro.

Baldaŭ la arboj komencis maldensiĝi kaj Vladimiro elveturis el la arbaro. Ĵadrino ne estis videbla. Estis ĉirkaŭ la noktomezo. La larmoj ekfluis el liaj okuloj; nun li veturis rekte antaŭen. La vetero trankviliĝis; la nuboj disiradis; antaŭ li kuŝis ebenaĵo, kovrita de blanka ondforma tapiŝo. La nokto estis sufiĉe luma. Li ekvidis nemalproksime vilaĝeton, kunmetitan el kvar aŭ kvin kortoj. Vladimiro veturis tien. Ĉe l' unua dometo li elsaltis el la glitveturilo, alkuris al la fenestro kaj komencis frapadi.

Post kelkaj minutoj la ligna fenestra kovrilo sin levis kaj ia maljunulo elmetis sian grizan barbon.

“Kion vi bezonas?”

- “Ĵadrino estas malproksima?”

- “Ĉu Ĵadrino estas malproksima?”

- Jes, jes! Ĉu ĝi estas malproksima?”

- “Proksimeta, estos ĉirkaŭ deko da verstoj”.

Ĉe tiu ĉi respondo Vladimiro ekkaptis la kapon kaj restis senmova kiel homo, juĝita al la morto.

“El kie vi estas?”

- daŭrigis la maljunulo. Vladimiro ne havis la kuraĝon respondi je demandoj.

“Ĉu vi povas, maljunulo, - li diris, - preni por mi ĉevalojn ĝis Ĵadrino?”

- “Ni ne havas ĉevalojn”, - respondis la vilaĝano.

“Ĉu mi ne povas ricevi almenaŭ kondukanton? Mi pagos kiom al li plaĉos”.

- “Atendu”, diris la maljunulo, fermante la fenestran kovrilon, - mi elsendos al vi la filon; li vin kondukos”. Vladimiro atendis, sed apenaŭ pasis unu minuto, li ree komencis frapi. La fenestra kovrilo sin levis, la barbulo sin montris. “Kion vi bezonas?”

- “Kie estas via filo?”

- “Li tuj eliros, li prenas la botojn. Sed vi malvarmiĝis? Eniru varmiĝi”.

- “Mi dankas, elsendu pli rapide la filon”.

La pordego akre eksonis, la knabego eliris kun bastonego kaj iris antaŭen, jen montrante, jen elserĉante la vojon, kovritan de neĝaj amasoj.

“Kioma horo?” - demandis lin Vladimiro.

“Jam baldaŭ lumiĝos”,

- diris la juna vilaĝano. Vladimiro ne parolis jam pli eĉ unu vorton.

La kokoj kantis kaj estis jam luma tago, kiam ili alvenis Ĵadrinon. La preĝejo estis fermita. Vladimiro pagis la kondukanton kaj enveturis en la korton, al la pastro. Lia trio da ĉevaloj jam tie ne estis. Kia sciigo lin atendis!

Sed ni returniĝos al la bonaj Nenaradovaj vilaĝestroj kaj ni rigardos, kio ĉe ili fariĝas.

Ha, nenio!

La maljunuloj vekiĝis kaj eniris en la gastĉambron. Gavriilo Gavriloviĉ en nokta ĉapo kaj

mallonga varma surtuto, Praskovja Petrovna en vata noktsurtuto. Oni alportis la temaŝinon kaj Gavriilo Gavriloviĉ sendis la knabinon por sciigi de Mario Gavrilovna, kia estas ŝia sano kaj kiel ŝi elripozis. La knabino revenis, sciigante, ke la fraŭlino ripozis malbone, sed ke nun ŝi fartas pli bone kaj ke ŝi tuj venos en la gastĉambron. Efektive, la pordo sin malfermis kaj Mario Gavrilovna eniris por saluti la patreton kaj la patrineton.

“Kion faras via kapo, Manjo?”

- demandis Gavriilo Gavriloviĉ'.

“Pli bone, patreto”, - respondis Manjo.

“Vi kredeble, Manjo, ricevis hieraŭ kapdoloron de forna haladzo”, - diris Praskovja Petrovna.

“Povas esti, patrineto”, - respondis Manjo.

La tago pasis feliĉe, sed en la nokto Manjo malsaniĝis. Oni sendis en la urbon al la kuracisto. Li alvenis vespere kaj trovis la malsanan en deliro. Aliĝis forta febro, kaj la bedaŭrinda malsanulino du semajnojn sin trovadis sur la bordo de l' tombo.

Neniu en la domo sciis ion pri la intencita forkuro. La leteroj skribitaj de ŝi estis jam bruligitaj; ŝia servantino nenion al iu parolis, timante la koleron de la gesinjoroj. La pastro, la eksa standardestro, la liphara geometriisto kaj la aminda ulano estis diskretaj, kaj nesenskaŭze. Tereŝka la veturigisto neniam ion senbezonan eldiris eĉ en malsobra estado. Tial la sekreto estis kaŝata de pli ol duona dekduo da kunsiantoj.

Sed Mario Gavrilovna mem, en senĉesa deliro, elrakontis sian sekreton. Tamen ŝiaj vortoj estis tiel mirindaj kaj neligeblaj kun io, ke la patrino - ne foriranta de ŝia lito - povis kompreni el ili nur tion, ke ŝia filino estis morte amanta Vladimiron Nikolajeviĉon, kaj ke kredeble la amo estis la kaŭzo de ŝia malsano. Ŝi konsiliĝis kun sia edzo, kun kelkaj najbaroj, kaj fine unuvoĉe ĉiuj decidis, ke videble tia estis la sorto de Mario Gavrilovna, ke la difiniton de l' sorto ni per ĉevalo ne forkuros, ke la malriĉeco ne estas krimo, ke oni ne vivas kun riĉeco, sed kun la homo kaj cetere. Similaj popoldiroj estas mirinde utilaj en tiuj ĉi okazoj, kiam ni mem nur tre malmultan povas elpensi por nia pravigo.

Dume la fraŭlino komencis saniĝi. Vladimiro jam longe ne montris sin en la domo de Gavriilo Gavriloviĉ. Li estis ja senkuraĝigita per la kutima ricevo. Oni decidis sendi al li kaj sciigi lin pri la neesperita feliĉo, la permeso je l' edziĝo. Sed kia estis la miriĝo de la Nenaradovaj vilaĝestroj, kiam kiel respondo al ilia invito ili ricevis de li duone malprudentan leteron! Li sciigis ilin, ke lia piedo neniam estos en ilia domo, kaj li petis, ke ili forgesu la malfeliĉulon, por kiu la morto restas la sola espero. Post kelkaj tagoj ili sciigis, ke Vladimiro forveturis en la militistaron. Tio ĉi estas en la 1812 j.

Longe ili ne havis kuraĝon paroli pri tio al la saniĝanta Mario. Ŝi neniam rememorigis Vladimiron. Kelkajn monatojn jam poste, trovinte lian nomon en la nombro de la honore distingiĝintaj kaj grave vunditaj ĉe Borodino, ŝi falis sensente kaj oni timis, ke ŝia febro ne revenu. Sed tamen, glor' al Dio, la sensento ne havis postsignojn.

Dua ĉagreno ŝin renkontis. Gavriilo Gavriloviĉ mortis, restigante ŝin heredantino de la tuta havo. Sed la heredo ŝin ne konsolis; ŝi kore dividis la malĝojon de la malfeliĉa Praskovja Petrovna kaj ĵuris neniam apartiĝi de ŝi; ili du forlasis Nenaradovon, la lokon de la malĝojaj rememoroj, kaj forveturis por vivi en vilaĝo.

Fraŭloj ĉirkaŭadis ankaŭ tie ĉi la amindan kaj riĉan fraŭlinon, sed ŝi donis al neniu eĉ la plej malgrandan esperon. La patrino iam konsilis al ŝi ke ŝi elektu edzon! Mario Gavrilovna balancadis

la kapon kaj fariĝis pensema. Vladimiro jam ne vivis: li mortis en Moskvo, tagon antaŭ la eniro de la Francoj. Lia memoro ŝajnis sankta por Manjo; almenaŭ ŝi konservis ĉion, kio lin povis rememorigi: la librojn, de li iam legitajn, liajn pentrojn, notojn kaj versojn, kiujn li por ŝi transskribis. La najbaroj, sciiginte pri ĉio, miris ŝian konstantecon kaj kun sciemo atendis la heroon venkontan fine la fidelecon de tiu ĉi fraŭlino Artemizo.

Dume la milito estis finita kun gloro. Niaj regimentoj revenadis el la alilando. La popolo iris al ili kontraŭen. La muziko ludis muzikajn kantojn: “Vive Henri Quatre”, tirolajn valsojn kaj ariojn el “Ĵokondo”. La oficiroj, kiuj eliris en la militon preskaŭ infanoj, revenis, viriĝintaj de milita aero kaj ĉirkaŭpenditaj per krucoj. La soldatoj ĝoje paroladis inter si, enmiksante ĉiuminute en la lingvon germanajn kaj francajn vortojn. Tempo ne forgesbla! Tempo de l' gloro kaj de l' ĝojo! Kiel forte frapis la rusa koro ĉe l' vorto “patrujo”! Kiel dolĉaj estis la larmoj de l' revido! Kun kia unuanimeco ni unuigis la sentojn de la popola fiereco kaj de l' amo je l' regnestro! Kaj por li, kia estis tiu ĉi minuto!

La virinoj, la rusaj virinoj, estis tiam sensimilaj. Ilia kutima malvarmeco perdiĝis. Ilia ĝojo estis efektive malsobriganta, kiam renkontinte la venkintojn ili kriadis: hura!

Kaj en la aeron ili ĵetadis la ĉapetojn.

Kiu el la tiamaj oficiroj ne konfesos, ke al la rusa virino li ŝuldis la plej bonan kaj la plej multekostan rekompencon?..

En tiu ĉi brilanta tempo Mario Gavrilovna vivis kun la patrino en la gubernio, kaj ne vidis kiel la du ĉefurboj festis la revenon de la soldataroj. Sed en la rondurboj kaj la vilaĝoj la komuna ĝojo estis eble ankoraŭ pli forta. La ricevo de oficiro en tiuj ĉi lokoj estis por li efektiva triumfo kaj al la amanto en frako estis ne plezure en lia najbareco.

Ni jam diris, ke malgraŭ sia malvarmeco Mario Gavrilovna kiel antaŭe estis ĉirkaŭata de fraŭloj. Sed ĉiuj devis foriĝi kiam ekmontris sin en ŝia palaco la vundita husara regimentestro Burmin, kun la Georgio en la buton-trueto kaj “kun interesanta paleco” kiel paroladis la tiamaj sinjoridinoj. Li havis ĉirkaŭ dudek ses jarojn. Li alveturis forpermeso en siajn vilaĝojn, kiuj sin trovis en la najbaraĵo de la vilaĝo de Mario Gavrilovna.

Mario Gavrilovna lin distingis. Apud li ŝia kutima pensemeco viviĝadis. Oni ne povus diri, ke ŝi lin koketis; sed la poeto, vidinte ŝian teniĝon, certe dirus: “Se amor non è, che dunque?”...

Burmin estis efektive multe aminda juna homo. Li havis tiun ĉi talenton, kiu plaĉas al la virinoj: la talenton de ĝentila senpena rigardemo kaj de modesta sprito. Lia renkontado kun Mario Gavrilovna estis rekta kaj libera; sed kion ajn ŝi dirus aŭ farus, lia animo kaj liaj rigardoj ĉiam ŝin akompanadis. Li ŝajnis de karaktero trankvila kaj modesta, sed la famo rakontis, ke antaŭe li estis terura sovaĝulo, kaj tio ĉi ne malutilis al li en la opinio de Mario Gavrilovna, kiu (kiel ankaŭ ĉiuj junaj sinjorinoj senescepte) kun plezuro senkulpigis la malprudentaĵojn montrantajn kuraĝon kaj fajrecon de l' karaktero.

Sed pli ol ĉio... (pli ol lia karesemo, pli ol la interesanta paleco, pli ol la bandaĝita mano) la silentado de la juna husaro vekadis ŝian sciemon kaj fantazion. Ŝi ne povis ne konscii tion, ke ŝi multe al li plaĉis; kredeble ankaŭ li kun sia sprito kaj koneco de la homoj povis jam ekvidi, ke ŝi lin elektis: kial ĝis nun ŝi ne vidis lin apud siaj piedoj kaj ne aŭdis lian konfeson? Kio lin retenadis? Ia, timemo, neapartigebla de l' efektiva amo, la fiereco aŭ la koketado de lerta amisto? Tio ĉi estis por ŝi enigmo. Pensinte bone, ŝi decidis, ke la timemo estis sole la kaŭzo, kaj intencis kuraĝigi lin per pli granda atenteco kaj, laŭ la okazoj, ankaŭ per karesado. Ŝi preparadis la plej neesperatan disligon kaj malatendeme atendis la minuton de la romana klariĝo.

La sekreto, kia ajn ĝi estus, ĉiam premas la virinan koron. Ŝiaj militaj operacioj havis la deziratan finon: almenaŭ Burmin fariĝis tiel pensema kaj liaj nigraj okuloj kun tia fajro haltadis sur Mario Gavrilovna, ke la decidanta minuto ŝajnis jam proksima. La najbaroj paroladis pri la edziĝo kiel pri fakto jam finita, kaj la bona Praskovja Petrovna ĝojadis, ke ŝia filino fine trovis por si indan fianĉon.

La maljunulino sidis unu fojon sola en la gastĉambro, diskuŝigante kartojn (la grande patience), kiam Burmin eniris en la ĉambron kaj tuj demandis pri Mario Gavrilovna.

“Ŝi estas en la ĝardeno”, - respondis la maljunulino; - “iru al ŝi, kaj mi vin tie ĉi atendos”.

Burmin foriris kaj la maljunulino faris la signon de l' kruco kaj ekpensis: nun eble la afero hodiaŭ finiĝos!

Burmin trovis Marion Gavrilovna'n apud la laĝeto, kun libro en la manoj en blanka vesto, kiel efektiva heroino de l' romano. Post la unuaj demandoj Mario Gavrilovna intence ĉesis subteni la interparolon, fortigante tiel la duflankan senkonsilecon, de kiu oni povis liberiĝi nur per subita kaj decida klarigo. Tiel ankaŭ fariĝis. Burmin, sentante la malfacilecon de sia pozicio diris, ke li serĉis jam longe la okazon por malkovri al ŝi sian koron, kaj postulis minuton da atento. Mario Gavrilovna fermis la libron kaj mallevis la okulojn por signo de l' konsento.

“Mi vin amas, - diris Burmin, - mi vin amas pasie...” (Mario Gavrilovna ruĝiĝis kaj mallevis la kapon ankoraŭ pli multe). “Mi faris sengardeme, donante min al la aminda kutimo, al la kutimo vidi kaj aŭdi vin ĉiutage...” (Mario Gavrilovna rememoris la unuan leteron de St. Preŭ.) “Nun estas jam tro malfrue batali kun mia sorto; la rememoro je vi, via aminda sensimila imago, de nun estos la turmento kaj la konsolo de mia vivo; sed al mi ankoraŭ restas plenumi la malfacilan devon, malkovri al vi la teruran sekreton kaj meti inter ni netrapaseblan barilon...” -

“Ĝi ĉiam ekzistis, - interrompis kun viveco Mario Gavrilovna, - mi neniam povis esti via edzino...” -

“Mi scias, - respondis li trankvile, - mi scias ke iam vi amis, sed la morto kaj tri jaroj da plorado... Bona, kara Mario Gavrilovna! ne penu forpreni de mi la lastan konsolon: la penson, ke vi konsentus fari mian feliĉon, se... Silentu, pro Dio, silentu; vi min turmentas. Jes, mi scias, mi sentas, ke vi estus mia, sed... mi plej malfeliĉa kreitaĵo... mi estas edzigita!”

Mario Gavrilovna elrigardis lin kun miriĝo.

“Mi estas edzigita, - daŭrigis Burmin; - mi estas edzigita jam la kvaran jaron, kaj mi ne scias, kiu estas mia edzino, kaj kie ŝi estas, kaj ĉu mi devas ŝin iam revidi!”

“Kion vi parolas? - ekkriis Mario Gavrilovna; - kiel ĝi estas mirinda! Daŭrigu! mi rakontos poste... sed daŭrigu, estu tiel bona!”

“Je la komenco de l' 1812a jaro, - diris Burmin, - mi rapidis Vilnon, kie troviĝis nia regimento. Alveninte unu fojon sur ian poŝtan stacion malfrue en la vespero, mi ordonis kiel eble plej rapide almeti la ĉevalojn kiam subite levis sin terura neĝa blovado; la poŝta inspektoro kiel ankaŭ la postilionoj konsilis al mi, ke mi atendu. Mi ilin obeis; sed ia nekomprenebla maltrankvilo min ekreĝis; ŝajnis, ke iu min puŝadis.

Dume la neĝa blovado ne trankviliĝadis; mi ne povis min teni, mi ordonis ree almeti la ĉevalojn kaj forveturis, malgraŭ la ventego. Al la postilono ŝajnis pli bone veturi trans la rivero, kio devis plimallongigi nian vojon per tri verstoj.

La bordoj estis kovritaj de neĝo, la postilono transveturis flanke de la loko, kie ni devis elveturi sur la vojon, kaj tial ni nin ektrovis en nekonata loko.

La blovego ne ĉesadis; mi ekvidis lumeton kaj ordonis veturi tien. Ni alveturis en vilaĝon; en la ligna preĝejo estis lumo. La preĝejo estis malfermita; post la barilo staris kelkaj glitveturiloj, en la vestiblo iradis homoj.

“Tien ĉi! Tien ĉi!” - ekkriis kelkaj voĉoj.

Mi igis la postilionon antaŭveturi.

“Sed permesu, kie vi estis tiel longe? - diris al mi iu, - la fianĉino sin trovas en sensenta estado; la pastro ne scias, kion fari; ni jam estis pretaj veturi reen. Eliru pli rapide!”

Silentante mi elsaltis el la glitveturilo kaj eniris en la preĝejon, malforte lumigatan per du aŭ tri kandeloj. Knabino sidis sur benko en malluma angulo de la preĝejo; alia frotis ŝiajn tempiojn.

“Glor' al Dio, - ŝi diris: - fine vi alveturis! Vi preskaŭ mortigis la fraŭlinon!”

Maljuna pastro proksimiĝis al mi kun la demando: “Ĉu vi ordonas komenci?”

“Komencu, komencu, patreto”, mi respondis senpense.

Oni levis la knabinon. Ŝi al mi ŝajnis ne malbela... Nekomparebla, nepardonebla knabeco... mi staris apud ŝi sur la altaro; la pastro rapidis; tri viroj kaj la servantino subtenadis la fianĉinon kaj estis okupataj nur per ŝi. Oni nin edzigis. “Kisu vin”, - oni diris.

Mia edzino turnis al mi sian palan vizaĝeton. Mi volis ŝin kisi... Ŝi ekkriis: “Ho ne estas li!” - kaj falis sen sentoj.

La atestantoj direktis sur min la terurigitajn okulojn. Mi turniĝis, eliris el la preĝejo sen ia malhelpo, ĵetis min en la glitveturilon kaj ekkriis: “For! Antaŭen!”

“Dio mia! - ekkriis Mario Gavrilovna, - kaj vi ne scias kio fariĝis kun via bedaŭrinda edzino?”

“Mi ne scias, - respondis Burmin, - mi ne scias, kiel oni nomas la vilaĝon, kie mi edziĝis; mi ne memoras, el kia stacio mi veturis. En tiu ĉi tempo mi tiel malmulte scietis la gravecon en mia krima ŝerco, ke, forveturinte de la preĝejo mi ekdormis, kaj revekiĝis la duan tagon frue, jam sur la tria stacio. La servanto, kiu estis tiam kun mi, mortis en la milito, tiel ke mi ne havas eĉ la esperon trovi tiun ĉi, kun kiu mi ŝercis tiel terure, kaj kiu estas nun tiel terure venĝita”.

“Dio mia, Dio mia! - diris Mario Gavrilovna, kaptinte lian manon: - Tio estis vi? kaj vi min ne rekonas?”

Burmin ekpaliĝis... kaj ĵetis sin al ŝiaj piedoj...

Tradukis el la rusa Antoni Grabowski 1888

<http://www.esperanto.org/Ondo/Rn-pusk2.htm>